

PENSEO

N-ro 147

Jan./2004

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 14-a jaro <http://www.elferno.net/penseo.htm>

Feliĉan Novjaron al Niaj Legantoj ! Red.

Novjara Mesaĝo

karaj legantoj,

Kiel flugas la tempo! Nia revueto jam transpasis la sojlon de sia 14-jariĝo. Retrorigardante la vojon iritan de penseanoj, ni sentas kaj ĝojon kaj fieron, ĉar ni daŭre marŝas antaŭen, surtretante obstaklojn kaj malfacilojn. Ne facile! Ni ne povas imagi, kiel fartus nia revueto, se ne apogo de legantoj venus al ni. Nun mi, en la nomo de "ni", esprimu mil dankojn al niaj persistaj subtenantoj, precipe el Ĉinio. Novjare, ni vidos la okaziĝon de 89-a UK en Ĉinio. Kiel ĉinaj esp-istoj, ni devas klopodi por sukcesigi la Kongreson. Nia redakcio planas dediĉi la julian numeron al Pekina Kongreso. Ni sincere esperas, ke niaj legantoj faru celebrajn kontribuojn. Antaŭdankon!

Vejdo

Nova Espero

—dediĉe al Zamenhofa Festo

Vejdo



Jen ankoraŭ iras nova sento,
Sur Interneto sonas forta voko;
Blovas plue l' verda forta
vento,

Esp-o soras de la baza loko.

Por homaro pacon soifanta
Ĝi prezentos novan familion,
de la mond' senĉese militanta

tiros homojn jen en harmonion.

Por ke realiĝu la espero
Daŭre luktas ĝiaj batalantoj;
Por ke progresadu la afero
Konas ne laciĝon esperantoj.

Kvankam staras muroj de miljaroj
Ni popoloj restas dividitaj,
Jam decidis salti ni trans baroj,
Spite al karnkorpoj disbatitaj.

Sen ŝanĝado de la fundemento,
Konfidante unu la alian,
Ni samideanoj en konsento
Kreos la etoson familian.

Nia persistanta kolegaro
Por la idealo ne laciĝos,
Penas je la bono de l' homaro
Ĝis la verda plan' efektiviĝos.

** ** *

Neforgesebla Kunloĝado

Kane Yu

En la 25-26a de oktobro okazis esperantista kunloĝado en urbo Huangshi. Pro longa distanco inter la du urboj mi kaj sinjoro Xie Kui decidis pliantaŭigi nian veturon por ĝustatempe partopreni.

Tagmeze de la 24a ni ekveturis aŭtobuse. La veturo daŭris pli ol 5 horojn. Dum la veturado ni multe babilis pri la vorto "kunloĝado", pri kiu samideanoj multe diskutis lastatempe enrete. Ni babilis ankaŭ pri urbo Huangshi,

kiu ŝajnis iom sankta en mia memoro. En la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento oni kulturis tie kelkdek milojn da esperantistoj pere de Koresponda Esperanta Lernejo. Kaj ankaŭ de tie venis esperantista pioniro, sinjoro Deng Huijin al nia urbo Jingzhou, kaj ĝuste de tiam ekaktivis Esperanta movado en nia urbo.

Pro trafika akcidento sur la ŝoseo nia aŭtobuso devigite haltis tri horojn. Je la 9a nokte ni finfine atingis la urbon. Elaŭtobusiĝinte ni trovis sinjoron Begonio okulvitritan kaj inteligentan, kiu atendis nin jam pli ol tri horojn. En la aŭtobuso al nia celloko, tetrinkejo "Ne Disiĝo Sen Renkontiĝo" ni gaje parolis Esperanton. Iu fraŭlino sidanta apud ni zorgeme aŭskultis nian interparolon, kaj finfine demandis min, "Ĉu vi parolis la korean?" "Ne, ni parolis Esperanton," mi respondis ĉine.

Kiam ni atingis la trinkejon, kie jam atendis nin sinjorino Zhou Taohua, posedantino de la tetrinkejo kaj prezidantino de Huangshi-a E-asocio, kaj lokaj samideanoj. La gastigantino tuj regaligis nin per bonodora teo. Poste Begonio kaj alia samideano kondukis nin al gastejo, kie ni estis tranoktiĝontaj. Kvankam la veturo iom estis laciga, ni ne deziris perdi ŝancon por babilo. Mi proponis bieron, kiu neniam mankeblas al viroj por ĝojiga babilado. Sidante en malgranda butikoj, ni ĝoje babilis en nia komuna lingvo Esperanto. Jam estis profunda nokto, kiam finiĝis nia drinkado. Sciiginte, ke la hejmo de sinjoro Begonio estas malproksima de tie, ni invitis lin tranoktiĝi kune kun ni. Ni kunigis du mallarĝajn litojn en larĝan, por ke ni tri povu dormi kune. Matene mi ŝercis kun Begonio, "Ni ja sukcese kunloĝis! Ĉu kunloĝado ne signifas, ke homoj dormas kune?"

La inaŭguro okazis posttagmeze de la 25-a. En trinkejo, ĝuante teon kaj babilante kun lokaj samideanoj, ni atendis la alvenon de samideanoj el urbo Wuhan. Aŭdinte la konatan

vorton "saluton", mi vidis amason da samideanoj. Inter ili mi facile rekonis la samideanojn, kiujn mi ankoraŭ ne renkontis persone, tamen kies fotoj surretaj estas konataj al mi. Jen dika Weishan, jen erudicia Trigo kaj eleganta Hu Xu. Tuj en la salono ŝvebis Esperantaj paroloj, ja E-etoso!

Post tagmanĝo okaziĝis inaŭguro en restoracio "Familio Sur Akvo". Tio, kio tute surprizis min, estis tiuj kelneroj de la restoracio, kiuj eĉ salutis nin en flua Esperanto, kiam ni atingis tien. Dum la kunveno ĉiuj samideanoj prezentis sin esperante. Kaj sinjoro Hu Guozhu faris prelegon. La kunveno daŭris kelkajn horojn en ĝoja etoso. Vespere gastigantoj preparis abundajn manĝaĵojn. Samedeanoj foje kaj foje tostis por amikeco kaj neforgesebla renkontiĝo. Post vespermanĝo komencis amuza vespero. Samideanoj kantis kaj dancis gaje. En ĥoro "Neforgesebla ĉinokto" finiĝis la vespero.

Nokte en gastejo mi konatiĝis kun sinjoro Mo, samideano el urbo Wuhan, li estas ordinare aspekta sed entuziasma. Pro la sama ideo ni tuj forgesis lacecon kaj babilis per Esperanto. De li mi sciis multon pri la zigzaga vojo de li irita, kaj anektdojn pri E-movado. Ni ĝoje babilis ĝis la 3a matene. Kvankam estis la unua fojo por mi partopreni en tia aktivado, tamen ĉio, kion mi vidis profunde kortuŝis min. Ni ĝoje kunvenis ne nur por la lingvo mem, sed por la granda idealo, kiun kreis nia majstro Zamenhof.

Dum la kunloĝado la dentdoloro multe turmentis min. Sciiginte pri mia doloro, sinjoro Fu Yongjun, loka samideano tuj alportis al mi medikamentojn. Antaŭe ni ne konatiĝis, tamen lia afableco kaj frateco varmigis mian koron. Dankojn al kara sinjoro Fu!

Feliĉa tempo ĉiam ŝajnas mallonga. Tagmeze de la 26a, reveninte de la ekskurso, ni tagmanĝis en tetrinkejo, kaj baldaŭ venis tempo por disiĝi. Ni manpremante adiaŭis. Ĝis


Wuhan venontfoje!



Kiam Batos Hor' de Mia Morto

Yu Guangzhong

Kiam batos hor' de mia morto
 min enterigu inter
 la Rivero Flava kaj Janzi-rivero
 kaj surkusenigu mian kapon
 kun grizblankaj haroj sur nigran grundon.
 En Ĉinio, la plej bela, patrineca lando,
 mi endormiĝu trankvile, sur la tuta vasto
 ambaŭflanke sonas rekviemo el al du riveroj
 kiel du eterne-vivaj muzikiloj, torentantaj
 orienten
 La plej larĝa, la plej indulgema lit' ĝi estas
 kie unu kor' kontente dormas kun profundaj
 pensoj
 iam juna ĉino
 en la fridigita Miĉigan' rigardis okcidenten
 tra mallumo por aŭroron serĉi en Ĉinio
 per okuloj siaj kiuj vid-fiksiĝis sur ŝin sep dek
 jarojn
 avideme kovris li la mapon, de la Okcidenta
 Lag' al Taihu Lago
 plue al turtplena Chongqing, kvazaŭ li
 rehejmenirus.




elĉinigis **Yang Fang**

Araneaĵo

Yu Guangzhong

krespusk' similas araneon insideman
 kiu vadante akvon nin atakas
 kaŝeme movetante siajn krurojn
 sur la kvietaj maro ne troviĝas spuro ĝia
 neniuj scias kien surbordiĝos ĝi
 jen kiam turnas nian kapon ni returnen

tuj ni konscias nin kaptataj
 falantan en senliman grizan reton ĝian



elĉinigis
Hongjia

La Homoj kun Sklaveca Personeco

Zhai Yujia

Kio estas sklaveca personeco? Ni povus
 imagi la scenon ke la sklavoj ŝvitege laboregas
 pelate de la vipo de la mastroj en la
 sklav-socio. Ĉiam, kiam la mastroj mallevas la
 vipon aŭ foriras, la sklavoj ĉesas labori, kaj
 malstreĉigas sin. Tial, la mastroj pli kaj pli
 intensigas superrigardon, kaj la sklavoj
 devigite obei silenteme.

La intenseco de laboro pliiĝas. Do,
 laŭrezono la sklavoj postulus rajton por ripozi.
 Tamen ĝenerala opinio estas, ke tia ago celas
 bonecon ne por individuoj solaj, sed por ĉiuj
 sklavoj. Tial neniu el ili volentas iniciati.
 Finfine, iu elstaras kontraŭ la mastroj, por ĉiuj,
 kaj ankaŭ por si mem. Sed la aliaj sklavoj
 rigardas lian agon perfida, senmorala. Iuj el la
 sklavoj intencas flati la mastrojn, kaj tuj
 forendas la ribelulon. Deposte, neniu kuraĝas
 postuli de la mastroj la rajton ripozi. Je la fino,
 la sklavoj ne plu povas toleri la kruelecon, kaj
 kune mortigas la mastrojn. Tio ĝuste estas la
 revolucio de sklavoj.

La personeco de sklavoj estas ombra kaj
 duflanka. Estintaj longtempe pelataj de vipo,
 neniuj ajn kuraĝas eldiri sian malfeliĉon. Ili
 scias nur toleri pasive, ne povas fari ion aktive.
 Ili tenas la mallaboremmon kiel la plej grandan
 feliĉon en la ĉiutaga vivo. La sklavoj akceptas
 sian sorton, kontentaj pri "stabila sklaviĝo".
 Post kiam ili estis liberigitaj, la plej malamatoj
 de ili ne estas la mastroj, sed estas Lincoln k.a.,
 la liberigintoj. Laŭ la vidpunkto sklava, la
 liberigintoj ja estas malamindaj. La sklavoj
 jam kutimiĝis al surgenuiĝado, la liberigintoj,

